

PENSEO

N-ro 387

jan. / 2024

**Monata Beletra Revueto en Esperanto
Honorita de Premio Grabowski, 1994**

Fondita en 1990; Enretigita en 1997 la 35-a jaro <http://www.elfino.cn/penseo/penlisto.htm>

Rita Mkrtĉjan (Armenio)



Bonan Esperanto-tagon!

Li havis belan verdan tason,
Per kiu verdan teon trinkis,
Per la skribilo, ankaŭ verda
Apud la tablo ion skribis.
Pentraĵo bela apud lito
Kun vojo verda, verda kampo
Kaj kiel stel' lumigis ĉambron
Per verda lumo eta lampo.
Forflugis jaroj, temp' trapasis
Li rememoris kun tenero
La tuta viv' ne estis "verda",
Sed hom' ne vivas sen espero.
Ne estis el ali-planedo,
Ne estis stranga vivekzisto,
Memorinsignojn verdajn gardas
Kun "verda" kor' Esperantisto!

Ĝis revido, aŭtuno!

La pluv', silento kaj sopiro
Senmovaj arboj enpensiĝis,
Pri kio pensas la folioj
La spuroj oraj antaŭ foriro?
Kaj iu fotas sub la pluvo
Belecon de natur' magia,
Ĉu aŭtun' trapasas, aŭ vivo?
Esperoj, revoj, atendado nia.
En regno vintra — montojn neĝajn
Nebulo kovris, sed ĉi-tie
La adiaŭ' de aŭtuno
Sur mano kuŝas la folio.
Pasanto daŭrigas foti

Pro pluvo frostas, pro malvarmo,
Neni' komprenas, kion fotas
Ĉu aŭtunajn aŭ siajn larmojn...

Moissey Bronshteyn (Rusio)



Se la Majstro venus en mondon nunan,
se disputojn vidus de l'samideanoj,
certe dirus li tuj: — Mi meritas punon,
ĉar verŝajne frue mi lavis la manojn.

Mi komprenas ke la mond' militanta
disdividas homojn al du tendaroj,
kaj pro tiu kontraŭstaro konstanta
nepre ja firmiĝas obstinaj baroj

inter la filistroj kun cerbo, plena
je la kvazaŭveroj de l' fia grego,
eliganta fluon de tromp' venena,
por en sangaj manoj plu restu rego.

Vanas parolad' pri "homoj kun homoj"
se unu alian nun buĉas beste,
se praviĝas monde la aksiomoj
pri kruel' natura kaj eta prez' de

homa viv' senkulpa, eĉ la infana!
Sed mi ja esperis pri kondukt' alia
de l'kultura aro samideana,
aspiranta al monda paco pia...

Rememoru, karaj: eĉ guto malgranda
per batad' detruos ŝtonegojn krudajn.
Ĉu anstataŭ interkverelo plej vanta
povus vi elekti nun pli saĝajn ludojn?

Mi, konscianta ke daŭras la vintro kaj la milito,
mi daŭre preta toleri, atendi, aspiri kaj pacience revii,
pensas, ke se la preteco sama kunigus nin multe pli, do ŝanĝojn videblajn, certe, ni pli rapide povus ricevi.

Ho ve, progresas la homoj pri opinia kunmuldo plej facile, se trompon ili akceptas anstataŭ vero,
sen peno pensi, kompari, konkludi, kaj ĉiu trompul' do trompas konvinke kun brila sukces' en maldigna afero.

Sed ne eternas eĉ plej longa vintro laŭ leĝo natura,
nek la militoj kapablas tra l' mondo tro longe drivi,
venos printempo nepre, kaj venos paco, do nura tasko mia esence plej grava estas –ĝisvivi.

Mi ne ŝatas babiladon pri mono,
ja ne garnas aĉan pladon admono de ŝtelema kuiristo post pledo,
ke ne havas tute karnon kotleto.

Mi ne ŝatas babiladon pri famo eĉ se havas certan flaton balzamo.
Kiu laŭdas min kaj tondre aplaŭdas,
eble poste alironde min fraŭdas.

Mi ne ŝatas babiladon pri l' into,
ĉar ĝin metas en salaton veninto al la rego per arogo defia,
kvazaŭ into estas predo nur lia.

Mi ne ŝatas, malakceptas, forigas ĉion, kio ne plencertas sed ligas trompajn faktojn kun la vero dubinda,
kvazaŭ estas mi partnero, sed blinda.

Balaiĝu babilulo rapide ĝis alia mondangulo,
sed mi de la haladzo kaj tumulto babila restu for, eĉ se en mutio.
Trankvila.

Ángel Arquillos (Hispanio)



Pardono

Ho pardonu min,
ĉar malheliĝas,
kaj la malhelo min tre timigas.
Ho pardonu min,
ĉar mia menso pro la malhelo de kutimiĝis arĥivi pensojn,
kaj miaj vortoj ne havas sencon.
Pro tio kara,
ho pardonu min,
jen mia peto,

via pardono
estos balzamo
por mia cerbo.

Wally du Temple (Kanado)



KIAJ ESTAS VERMOJ

Kiaj estas vermoj?
Ĉu nur senokulaj,
nur ŝlimvulgaraj?
Ĉu fabrikantoj de humo?
Ĉu farmistoj
kultivas aerume grundon?
Ĉu hedonistoj?
Pro gustoburĝonoj ĉie
sur siaj rozkoloraj korpoj
Ĉu ili sentas plezuron tiel subliman,
tiel dekadencan — ĉu mi kontribuu?
Ĉu pomŝelojn proponu
meti en la kompostujon?
Ĉu imagu la malluman,
ekstazon tordiĝantan,
el pomoj — la dolĉecoj
trapenetrantaj iliajn porojn?
Ĉu mi proponu betojn kaj petroselon,
avokadon kaj melonon,
ĉu la plumajn suprojn de karotoj.
Sed mi ne forgesu mian lokon sur la
menuo!
Ĉu vermoj estas rabantaj soldatoj?
Kiam ili ekscias ke mia korpo
sendefenda kiel senmura urbo
kuŝas en grundo?
Ĉu verma generalo ordonos
ke ses ondoj de trupoj invadu mian
kadavron,
ke ĉiu ondo unue altiĝu,
poste svingu malsupren,
poste forruliĝu, kreante vojon
al aliaj ondoj ĝis ĉiu kvartalo
de mia korpa urbo dispeciĝos
glute kaj vermtriumfe?

William Butler Yeats (1865 - 1939)

La Dua Venoj

Turniĝante kaj turniĝante en larĝiĝanta giro
La falko ne povas aŭdi la falkiston;
Aferoj disfalas; la centro ne povas elteni;
Nura anarkio estas liberigata monde,
La sangita tajdo ombre liberiĝas, kaj ĉie
La ceremonio de senkulpeco estas dronita;
La plej bonuloj mankas ĉia konvinko, dum
la plej aĉuloj
Estas plenaj de pasia intenseco.
Certe iu revelacio proksimas;
Certe la Dua Venoj proksimas.
La Dua Venoj! Apenaŭ tiuj vortoj eliĝas
Kiam vasta bildo el Spiritus Mundi
Skuas mian vidpovon: ie en sabloj de l'
dezerto
Formo kun leona korpo kaj vira kapo,
Gapo malplena kaj senkompata kiel la suno,
Movas siajn lantajn femurojn, dum ĉirkaŭ ĝi
Kirlas ombroj de indignaj dezertaj birdoj.
Nigreco denove falas; sed nun mi scias
Tiuj dudek jarcentoj da ŝtona dormo
Estis koŝmaro ĝene kaŭzita de balanciĝanta
lulilo,
Kaj kia kruda besto, ĝia horo finfine
alveninta,
Stumblas kaŭrkline al Betlehemo por
naskiĝi.
Tradukis Wally du Temple (Kanado)
La Laginsulo de Inisfri'
Mi volas ekveturi kaj nun iras tuj al
Inisfri',
kaj kabaneton jen masonos kun argil' kaj
branĉo bela;
Naŭ vicojn de sojfab' kaj abelujon havos
mi,
kaj loĝos sole en kvieta ejo kun zumad'
abela.
Kaj mi havos kelkan pacon, ĉar la paco
lante venas,

de vual' matenkrepuska al kantloko de
kriketo;
Noktomez' lumflagras kaj tagmez' la
purpurecon tenas,
kaj vespero jam pleniĝas de flugiloj de
parubirdeto.

Mi veturas kaj nun iras, ĉar en ĉi
tagnokt' iriza,
aŭdas mi lagakvon plaŭdi borde kiel
sanktkantoro;
Dum mi staras sur ŝoseo, aŭ eĉ sur
pavimo griza,
aŭdas mi akv-ondon en profunda kerno
de la koro.

Esperantigis

Yi Qiao (ĉino en Germanio)

Pri W. B. Yeats

William Butler Yeats (1865-1939) estas unu el la plej grandaj el ĉiuj irlandaj poetoj. Lia unua kolekto, Crossways, aperis en 1889 kiam li daŭre estis en siaj mez-dudekaj jaroj, kaj lia frua poezio portis la klaran influon de Romantikismo. Ĉar lia kariero formiĝis kaj literaturaj inventoj venis kun modernismo en la fruaj jardekoj de la dudeka jarcento, la laboro de Yeats retenis sian fokuson sur tradiciaj versformoj kaj rimkabalaj, sed li iĝis pli politika, pli aluda, kaj pli elipsa.

La Dua Venio; verkita en 1919

La poemo, resume, profetas, ke iu speco de Dua Venio (tradicie, tio estas la reveno de Kristo al la Tero, kiel estis promesite en la Nova Testamento) estas ŝuldata, kaj ke la anarkio kiu ekestis ĉie en la mondo (parte ĉar de la okazaĵoj de la Unua Mondilito, kvankam la tumultaj okazaĵoj en la hejmlando de Yeats de Irlando ankaŭ estas malantaŭ la poemo) estas signo ke tiu Dua Venio ne povas esti malproksima. (Yeats skribis 'The Second W B Yeats Coming' en 1919, kaj ĝi du jarojn poste estis publikigita en lia volumo Michael Robartes and the Dancer.

Antaŭ la jarmilo, la 2000-a datreveno de la naskiĝo de Kristo – tradicie, ĉiuokaze – multaj homoj komencis pripensi la eblecon de ĉi tiu "Dua Venio"

pli.) La "giro" metaforo Yeats uzas en la unua linio. (indikante cirklan moviĝon kaj ripeton) estas kapjeso al la mistika kredo de Yeats ke historio ripetas sin en cikloj.

Sed la turniĝo 'larĝiĝas': ĝi pli kaj pli malproksimiĝas de sia centro, sia devenpunkto. Resume, ĝi perdas kontrolon, kaj "la centro ne povas teni".

Sed kia Dua Venio ĝi estos? Jam preskaŭ pasis 'dudek jarcentoj', aŭ 2000 jaroj, de kiam Kristo venis al la Tero en homa formo kaj estis krucumita; kia 'malglata besto' ĉi-foje malkaŝos sin? Eble ĝi ne estos Kristo en homa formo, sed io tute alia.

La referenco al Spiritus Mundi, laŭlitere "spirito de la mondo", estas, kiel la "giro", alia aludo al la kredoj de Yeats: por Yeats, la Spiritus Mundi estis speco de kolektiva animo enhavanta ĉiujn kulturajn memorojn de la homaro - ne nur kristanan. memoroj, sed tiuj de aliaj socioj.

Yi Qiao (ĉino en Germanio)



Mia abio

(dediĉe al la Zamenhof-tago)

Jen en fund' de mia grizĝardeno
staras l' alt-abio jam centjara.
Min inspiras ĝi kun gracia beno
dum natura depresi' amara.

Ĝiaj brakoj viglaj freŝe brilas
neĝkovritaj feste por Advento.
Spite rigorfroston ĝi trankvilas
fronte al la vintra fritita vento.



La abi' fariĝis bonkunulo
en la vivo mia kunsufera.
Ĝi alportas fidon laŭ postulo
kaj mi stimulas plenespera.

La abio jam en vintresevero
scias, ke jen venos primavero.

Infaneco en memoro

Lanta briz' susuras jen mildsona,
hela l' suno vekas min matene.
Infanec' en songo ja impona,
ovras mi okulojn iom ĉagrene.

Jaroj sen ajn ĝeno jovialas,
infantempo restas ĉiam ĉarma.
Hejmvilaĝo bene idealas,
hieraŭa ĝojo jen korvarma.

Pasintecaj ridoj en memoro
sonas ĉiam kun esper' fiera.
Dum medit' mi mutas kun humoro,
sopirante al junec' sincera.

Nun suspiras mi kun blanka haro,
kaj pli nostalgias jar' post jaro.

Blazio Vaha (Hungario)



Plu ne — ne plu

Mankas al ci,
mankas al vi,
mankas al ni
iam temp',
ho ne manku
al ni tamen
pri ni disaj
plu — atent'!

Hungara popola Kristnaska kanteto

(iom adaptita de mi)

Pro la peto de Jozef'
jam naskiĝis Jesuet'!
Li jam kuŝas en la trog'
lin admiras ŝafo, kok',
gloras lin ankaŭ la kokin'!
Jen tri reĝoj, lertaj magoj,
kun tri plenaj dorsosakoj

serĉas kie loĝas Li,
kun la sankta famili',
Jen alvenas paŝtistetoj
kun krem-plenaj trink-potetoj,
dolĉa kuko, estas eĉ,
blanka pano kun pasteĉ'!

Yohanes Manhitu (Indonezio)



Vivi per vortoj

Jam delonge mi kutimis
vivi per vortoj.
De litero al litero kunligitaj,
mi ĝuas liberecon.
Vortoj estas kiel tranĉilo:
uzata de iuj homoj por labori,
uzata de aliaj por vundi.
Vortoj donas al mi belan vivon.
Jam delonge mi kutimis
vivi per vortoj.
Tagon post tago, mi provas
konstrui la estontecon per vortoj.

Paperfloroj

Beleco troviĝas en ĉiu loko,
troviĝas ankaŭ en paperfloroj
faritaj per ambaŭ manoj
imitante naturajn florojn.
Beleco ankaŭ troviĝas en falsaĵoj.
Se ni malkonas kio estas originala,
hodiaŭ aŭ iam en la estonteco,
malvero aspektos natura.

Papos Nascentes (Brazilo)



Unua esprimo

el la diskurso
la kurson
— ne stagnan akvon

el la teksto
ĝian kaŝitan senson

— ne la deziratan pretekston

el la formulo
la elpelilon kie la forto
virtuale dormas

el la vorto
la malplenon de felina salto
en l' abismon de konotacioj

volas mi fine el la poemo
ne nur l' emblemon,
sed skuon, sismon, tertremon
— tia poezia produkto
(sekreta nomo de lumo)

Nenomebla

Taon yin-yang brakumas
Tao unikas ununuras
Isis'-Osiris' Horuson donas
Horus' respektegas l' paron
ekestas Dio Patrin'-Patro
Amo inspiras fidon
dancas Animus-Animo
tiel ridetis Psiĥo

scie sentas Konscienco
Nemanifesto-Manifesto
cetere, Unuo Unuo
Nemanifesto ne loka ondo
Manifesto loka partiklo
Unuo – Komenca Konscienco

Erika Godó (Hungario)



Neĝfloktoj

Neĝfloktoj dancas en la neĝado,
miraklo de la naturo falas sur la teron.
Blanka-vualo kovras la pejzaĝon,
blankaj neĝfloktoj briletas sur la tero.

Ili falas kaj ripozas sur la tero kaj arboj,

kaj supre de domoj kiel mola litkovrilo.
La magio de neĝfloktoj ĉiuj homoj admiras,
la vido de neĝfloktoj varmigas niajn korojn.

En vintro, vi estas mirakloj de la naturo,
ĉar ne du neĝeroj havas la saman.

Dancu kaj flugu en la vento kara neĝflokto,
ĉar via beleco alportas komforton por
animoj.

Kristnasko

Venos la Kristnasko, kiun ni atendis dum la
tuta jaro,
feliĉo kaj sopiro moviĝas en niaj koroj ĉi tiuj
tagoj.
En Kristnaska vespero, la pejzaĝo fariĝas
blanka,
la festaj lumoj de la urboj fine ŝaltas por ni
ĉiuj.

La kristnaska arbo estas plena de mirindaj
ornamaĵoj
brilaj buloj, zingibra pano, dolĉaĵo, sonorilo
kaj anĝelo.

La flamo de la kandeloj portas varman
lumon en la ĉambron,
ĉiuj en la mondo estas pli feliĉaj en tiu
periodo de kristnasko.

Familioj kuniĝas kaj ĉiuj homoj havas
rideton sur sia vizaĝo,
Brakumoj, donacoj kaj bondeziroj estas tre
grava tiu tempo.
La tablo estas metita kun bongustaj
manĝaĵoj kaj trinkaĵoj,
feliĉa tempo pasigita kune, memoro de
tio ĉiam estos kun ni.

La festo de Kristnasko alportas pacon al la
mondo kaj al nia koro,
ni haltas momenton por ripozi kaj festi en ĉi
tiu rapida mondo.

Ni zorgas unu pri la alia, ni dividas la amon
ĉe Kristnasko,

kvankam estus bone ami unu la alian tiel ne nur dum unu tago.

Hans-Georg Kaiser (Germanio)



La knalo

Aŭdiĝis iam granda knalo
en iu pitoreska balo.
Aĥ, se ĝi estus vinofalo,
volonte estus mi la valo.

Sed estis tamen granda knalo
kaj tute ne nur sektsignalo.
Kaj tial nun eĉ generalo
post puĉo tronas en la halo.

Jadranka Miric (Serbio)



Preĝo

Preĝas mi
al kara Di',
Permesu al ni
ke popolo vivu en harmoni',
ke ekregu pacon inter via
militante diŝjetita popolo pia!
Ke niaj etendiĝitaj manoj
vigligu noblan amikecon,
ekregu solidareco inter homoj!
Permesu ke lumo, sano kaj ĝojo
redonu ridon en koron
anstataŭ militvojo!

Vintras

Vintra vent' forte batas
eĉ neĝon sur domsojlon aljetas .
Sur fenestro glacias aranea neto
pli bela ol silke brodita kateto!
En domkorto staras neĝo-homo
farita de infanaj manetoj kun verda pomo
en buŝon , sub granda karotonazo!
Kaj balailo metita subbrake por ĉiu kazo
se pluve okazos neatenditaj aferoj!
Ja, ĉio dependas de venontaj veteroj!

Ardo (Ĉinio)



for la hirundo,
sed printempo ne estas
for de korfundo.
leviĝas l' luno
en mistera brillumo
kun bon-fortuno.

Luofu (1928 - 2018)

Trunkite

Iu ŝajnis frapi mian pardonon
Pro kio bruis la falintaj folioj en la
korto
Mi balais ilin ĉiujn
en travideblan plastan poŝon
Aŭtuno, rampante en ĝi
Rubekolo kun branĉo de artemizio
preterflugis la fenestron
Nur tiam mi scias, kiom vi sopiras la
solecon de polvo
Skribita letero ne estu sendita
Ĉar mi ĵus aŭdis,
ke skeletoj en profunda monto tondre
eksplodis

* *Lofu, fama ĉinlingva poeto, kandidato al Nobel-premio, li estas konata kiel la "Poezia Demono" en poezia rondo.*

(tradukis Ardo)

Elena Popova (Bulgario)



Vintra pejzaĝo

Luno kaj lampo
konkuras en la parko.
Neĝo sur benko.

Flaviĝas floroj

preter senhoma voj'. Sur
montopint' – neĝo.

Voj' tra arbaro.
La vintro kun inspiro
pentris ja bildon.

Neĝo sur arboj –
blovis ja Norda vento.
Sunsunsubir' lila.

Neĝa ventego
alblovigis ja lavangojn.
Homoj en plago.

2023

Neĝventego

La griza ĉielo sin apogas al la nudaj
branĉoj de la arboj. La paseroj kaŝis sin sub
la tegoloj. Eĉ la kateto ne kuraĝas montri
sian nazon ekstere, ĉar norda vento
blovegas.

La tegmentoj kun blankaj ĉapoj kaj la arboj,
kiel maljunuloj blankiĝitaj, nur sin
interrigardas silente – venis siberia frostoj.
La homoj atendas ĝian finon, pensante pri la
suno.

La neĝventego branĉojn interplektas,
forbalaas tegmentojn, purigas vojojn aŭ
amasigas lavangojn. Ĉu vi aŭdas? Ĝi ridas
kontenta...

Ruĝa rozo

Frumatene mi vidis ruĝan rozon inter
dornoj kaj haltis pro miro. Ĝi estis ŝprucita
per perloj el la roso. La suno sendis siajn
radiojn por saluti ĝin, kaj la rosgutoj trinkis
ilin. Kaj antaŭ miaj okuloj ili kreis magion.

— Bela floro, mi demandis, kiel vi staras
inter tiuj ĉi dornoj tute sola? Ĉu vi ne timas,
ke ili sufokos vin?

—Kiu timas perdi ĉion, eĉ sian vivon. Ni
estis kelkaj arbustoj, sed neniu prizorgis nin.
Miaj najbaroj ektimis kaj ili malaperis —

forvelkis. Mi volis vivi, do mi kolektis miajn
fortojn kaj pluivivis. La dornoj protektas min
per folioj kaj branĉoj kontraŭ la vento, ili
tenas la malsekecon proksime de mi, kaj mi
dankas ilin per la bonodoro de miaj floroj. Ili
ankaŭ floras kaj estas utilaj kiel herboj.
Kiam niaj burĝonoj malfermiĝas, abeloj kaj
papilioj flugas al ni. Birdoj kantas ĉirkaŭe.
Mi estas feliĉa!

—Kaj vintre, kiam neĝo falas kaj malvarmo
frostigas la Teron, inter la dornoj nudaj, kiel
vi vivas?

—Ili konservas la neĝon kaj faras varman
litkovrilon. Ni scias kiel venki malfacilaĵojn
kune, ne fierante, sed helpante unu la alian.
Jen kiel ni pluivivas, revas kaj atingas niajn
revojn.

—Pri kio iu floro povas revii?

—Por alporti ĝojon al la aliaj!



Ivanichka Magharova (Bulgario)



Senstela ĉiel'.

Nur la luno sekrete
flirtas Venuson.

Neĝa blovado.

En la arbara pado
du paŝoj sur neĝ'.

Neĝ'. Bluso. Kamen'.

Virino sur la vojo.

Silent' eksonas.

Maneĝ'. Ĉevalkur'.

Ŝi balancas. Pli blanka
ol pala nuanc'.

Vespera malĝoj'.

Memoro el pasintec'

varmigas koron.

Ĉambro. Piano.

Nigraj, blankaj klavoj.

Ĉi gastas Mocart’.

Printempa vento

sur ombro de l’ nebul’.

Pasero saltas.

Vespersunsubir’.

Forlasita domo.

Hundo sur l’ sojlo.

Rainer Maria Rilke (1875-1926)

Advento

La vento vintra en advento

Neĝerojn pelas tra arbar’

Abion sorĉas pia sento

De lum’ en finiĝanta jar’

Etendas branĉojn ĝi al vojo

Aŭskultas, kaj jam pretas por

Festadi en mistera ĝojo

La sanktan nokton de la glor’

Elgermanigis



Ulrich Matthias (Germanio)

Advento

La vento pelas en vintra arbaro
kiel paŝtisto gregon de neĝfloko.

Iu abio aŭguras, ke baldaŭ sur aliloko
ĝi fariĝos pia kaj sankta en ĉi jaro.

Ĝi aŭskultas ion kaj al blanka vojo
etendas siajn branĉojn, prete en koro.
Ĝi rezistas al vento kreskante kun ĝojo
fronte al la unu nokt’ de pimpa gloro.

Elgermanigis

Yi Qiao (ĉino en Germanio)

Valbona Kolaveri



Sentimentaj paraleloj

Sentimentaj paraleloj,

Multobliĝas notinde

Ĝis la infinito,

De la dormemaj okuloj

De la koro

Fronte al milo da veroj.

Kaj krias

Malsatece,

Al la egoo de la animo.

Per la forto de la solulo

Atendanta la venkon.

Sed vane

Ĉar, pasinte

La tagoj kaŝitaj,

Ne kombineblaj

Venadas la kolektivaj memoroj

Ĉe la muroj de la memoro

Kie la esperumoj

Por la morgaŭo

Enombriĝas

Senvoĉe

Kie oblikvaj

Eventoj

Pikas plejeble

Kaj tamen

Perdiĝas tra la forgesaj vojoj

Ĉiela sonĝo

Pikas min ĝisoste

Vi,

Ĉiela sonĝo,

Forglutanta mian amon

Saliganta la larmon


Bruliganta la animon.

Mi petas Diojn
 Ankaŭ alian
 Ankaŭ alian
 Alportu min
 Po unu, ĉiunokte
 Por ke mi plonĝu en la ĉielon
 Super la blankaj nuboj
 Silkecaj littukoj.

Miajn okulojn tio ebriigas
 Per la stelaj trembriloj
 Pasiaj

Poste,
 Eh hh, poste,
 Mi mortu
 Kvazaŭ martirino de la amo.

Tra la blankaj revoj
 Tra la anĝeloj
 Sen animaj luaĵoj
 Kiujn la koroj interŝanĝas
 Sen energia interŝanĝo



Elalbanigis



Bardhyl Selimi
 (Albanio)

El ĉina antikva poezio

Wang Yisun (?-?)

Falintaj folioj

—laŭ melodio *Akva drako*

Matene prujno kovris la arbaron verdan
 kaj l' regno pli aspektas dezertece.

Folioj sible falas al la ter'
 kaj amasiĝas dike en la korto.
 Folioj sur la branĉoj pretas en ventpel'
 defali ja en ĉiu ajn momento,
 senhomas padoj en la korto.
 Aŭtuna vento kirlas akvon sur river'
 kaj Donting-lago ondas furioze.
 Videble klare la malfru-aŭtuna
 etoso saturiĝas plene en aer'.
 Imagas mi, ke montoj jam korviĝas
 per falfolioj kaj fariĝas kalvaj,
 la vojoj ne plu vizitatas sen esper'.

Folioj ruĝaj, kiuj mi priskibis iam,
 nun eble fole fluas en kanal' palaca
 aŭ flosas subterakve jen leĝere.
 Senĉesaj ĉirpoĵoj de cikadoj,
 migrantaj birdoj pretaj suden flugi,
 jen pikas mian koron tre kruele.
 La falfolioj saltas tra l' fenestro
 pelmele kun susuraj sonoj, kiuj
 vibrigas la korkordon plensufere.
 Mi turnas mian vidon al la foro,
 sed kie estas mia hejmo?
 Se l' sceno de folifalado vere
 okazus ankaŭ en hejmlok' ĉinokte,
 kiu bonvolus forbalai en la korto
 amasigitajn falfoliojn ja prefere?

Chen Ke (1081-1137?)

—laŭ melodio *Budhista dancisto*

La verdaj grimplantoj plenkovras
 murpecojn,
 dum muskoj en korto sterniĝas surtere.
 Radioj de l' suno pallumas supere,
 kaj ŝosoĵ baŝoj volvitas sunlume.
 Jen la papilioj dancfliras leĝere
 nun super peron' ĉi kaj tien libere.
 Zefiro blovskuas la pordan kurtenon,
 ĝi tamen falpendas ĉiam senribele.

Hirundoj en paro kvikvitas sur traboj,
 la flokoj salikaj turniĝas en lago.
 Aŭdiĝas ĝojkrioj de ludo de knaboj,

jen kiuj disrompas la songon en tago.

Jiang Jie (?-?)

—laŭ melodio *Belulino Yu*

En knabeco mi aŭskultis al pluvado
en etaĝdomo luksa, kie brulis la kandelo
kaj maldensa fum' ĉirkaŭas kulvualon.
En mezaĝo en boato sur rivero
mi aŭskultis al pluvado.
Vastis akvsurfac' kaj nuboj en aero
tre malalte pendis, kaj en vento
el uesto gakis triste la sovaĝansero.

Nun mi aŭskultas al pluvado
en kvieto sub la templ-alero.
Miaj haroj grizas ĉe l' tempioj,
kaj mi jam ne zorgas plu kun celo
pri malĝojo, ĝoj', disig' kaj rekuniĝo
de la homa mondo sur la tero.
Mi aŭskultas nur al pluv-gutado
sur peronon ĝis tagiĝa helo.



—laŭ melodio *Branĉo da umefloroj*

Ĉagreno mia en printempo
bezonas vinon por mildig' de ĝeno.
Veturante per boato mi rigardas
vendejajn reklam-flagojn sur la
bord-tereno
flirtadi por alvoki gastojn alvenontajn.
Mi preterlasas kun splen-pleno
la vidindaĵojn belajn, kiaj ponto kaj
pramejo,
jen ĉiujn en zefir' kaj pluva beno.

Kiam mi povos ja reiri hejmen
per la vojaĝo longa kun sekuro?
Kiam mi povos dum la libera tempo
plektradi la liuton kun plezuro,

kaj ekbruligi incensaĵon de benpeto
en bonhumor', kun bonaŭguro?
Temppas' facile maljunigas
kaj sendas homojn al obskuro.
Sezonoj ja alternas, ĉerizberoj ruĝas,
kaj poste la baŝoj pompas en freŝverda
puro.

Elĉinigis



Vejdo (Ĉinio)

Ĉineske

Vejdo (Ĉinio)

Soleco

—laŭ ĉinesko *Subigo de ŝtormo*¹

Mi mute sidas sola
en kabano izola.
min sentas mi ĉa grene
plene,
en sent' malbonhumora.

Mi vivas ja suferi
vere
jen sen familianoj.
Kvankam mi fartas sane,
vane
mi pensas kun pasio.

Bonan matenon!

—laŭ ĉinesko *Proksimiĝas bona afero*²

Bonan matenon!
Salutas kun sincer'
mi al ĉiuj pasantoj
bonaj kun esper'.

Profite matenhorojn
vi kun sinofer'
ja eku labori

sen ajna leĝer'!

Sunsubiro ĉe rivero

—laŭ ĉinesko *Riverborda urbo*³

Sunsubiro ĉe river'
 en or-hel'
 kun lumbel'
 ja okazas
 kalme je vesper'.
 La sun' moviĝas lante
 al la ter'
 el ĉiel'.

Kiel la flava teler'
 en aer'
 sen ventpel'
 sun' fandiĝas
 en nebula sfer'.
 Tujas sun-malaper'
 en eter'
 kun mister'.

Yi Qiao (ĉino en Germanio)

Jasmen-teo

— laŭ ĉinesko *Subiĝo de ŝtormo*¹

Plaĉas jasmen-te' al mi,
 ĝi vaporas kun radi',
 freŝaromas prefere,
 vere
 bongustas je harmoni'.

Ĝin trinku frumatene,
 bene
 ĝojas vi dum tuta tag'.
 Trinku en kor-sereno,
 beno
 restas ĉiam laŭ imag'.

—inspire de l' poemo *Jasmeno ekfloras* de s-ro
 Vejdo, espereble ni kunĝuas la jasmen-aromon.



Bonan vesperon

— laŭ ĉinesko *Proksimiĝas bona afero*²

Bonan vesperon,
 krepusko ĉe l' maro!
 Luno jen ridetas
 kun serenklaro.

Bontempas por plezura
 amuz' sen baro.
 Melodi' resonas
 tra l' buntkamparo.

Bonan vesperon,
 subluma sunsubir'!
 Krepusko sur tero
 buntas kun inspir'.

Bontempas por kvieta
 medit' en sopir'.
 Lunlumo serenias
 kun bona dezir'.

—inspire de l' poemo *Bonan matenon* de s-ro
 Vejdo, jen la mia laŭ la sama melodio.

Sunleviĝo

— laŭ ĉinesko *Riverborda urbo*³

Sunleviĝo ĉe l' river':
 pomp-aper'
 kun fier'.
 Sunradias
 super borda sfer'.
 Nova tago aŭroras
 en splenda
 plenesper'.

Gloras sunlum' sur ĉiel'
 tra aer'
 en liber'.
 Kun elano
 dotas nin prosper'.
 Ĉi maten' nin ekzaltas
 impone

je mister'.

—inspire de l' poemo *Sunsubiro* de s-ro Vejdo, jen
la mia laŭ la sama melodio.

Novjara aspiro

— laŭ ĉinesko *Belulino Yu*⁴
Umefloras dum Advent',
flirtas neĝ' laŭ l' vent'.
Antaŭ Kristnasko ni jam
festas Zamenhoftagon el am'.

Sankthimno sonoras jen
kun gracia la ben'.
Aspiras la novjaro
mondpacon de l' tuta homaro.

Jadranka Miric (Serbio)

Pluvas sitele

—laŭ ĉinesko *Sopir-al-sudo*⁵
Griza tag'
ie kaŝis sin
venteto. Fojfoje ĝin
tre milde karesas min.
anoncante sin..

Sed tio
ne sufiĉas por
disbati la nubaron.
kaj heligi tagon por
plaĉi al ni. For!

Iru for
de la ĉiel'. Sun'
eliru varmigi nin!
En via suna brakum'
ni estu ĝis Lun'!

Ĝisnokte
pluvis sitele.
Frapetis pluvgutetoj
laŭritme. Turtoj cele
kaŝis sin bele.

Noktiĝis.

Tutnokte pluvis.

Surstrate trafikado
nokton brue diskudris.

Dum hundoj bojis!

1. *Subigo de ŝtormo (ĉine: dingfengbo): ĉina fikforma poemo el du strofoj kun 5 kaj 6 versoj respektive de 7,7;7,2;7;/ 7,2;7;7,2;7; silaboj, laŭ rimarĝo aabba/ccdeed*

2. *Proksimiĝas bona afero (ĉine: haoshijin): ĉina fikforma poemo el du strofoj kun po 4 versoj de 56,65 / 75,65 silaboj, laŭ rimarĝo xa,xa / xa,xa (x = senrima)*

3. *Riverborda urbo (ĉine: jiangchengzi): ĉina fikforma poemo el samaj du strofoj kun po 8 versoj de 7, 3,3,45,733 silaboj, laŭ rimarĝo a,xa,a,xa,xa (x = senrima)*

4. *Belulino Yu (ĉine: Yumeiren) ĉina fikforma poemo el du strofoj kun po kvar versoj de 7,5; 7,9; / 7,5;7,9; silaboj kun para rimo.*

5. *Sopir-al-sudo (ĉine: Yijiangnan): ĉina fikforma poemo el kvin versoj de 35,77,5 silaboj laŭ rimarĝo xa,xa,a (x=senrima).*

Laimundas Abromas (Litovio)



La pilgrimado al Bjalistoko

—Mi iros al Bjalistoko, mia karulino, —mi diris
milde al mia edzino. — Vi nur ne nervozigu.

—Kion vi perdis tie? — ekinteresiĝis mia edzino.
— Nur vin oni ne vidis tie.

—Mi malsamopiniis, kontraŭis kaj riproĉis al la
kluba prezidanto kaj tiu forpelis min el la klubejo.
Disputi kun la homo, al kiu anticipa ĉiam ĉio estas
konata, ne indas. Mi malamas tiujn, kiuj ĉion scias.
Mi ne ŝatas la irantojn antaŭen. Ekvidinte tian, mi
ĉiam tiras tiun malantaŭen. Tamen mi plej malŝatas
la vicajn, simplajn geesperantistojn. Ĉu ili estas
bezonataj? Estu ĉiuj eksterordinaraj. Sed tiujn, la
eksterordinarulojn, mi entute malamas. Sufiĉas. Mi
iros al Bjalistoko, por serĉi tie la veron kaj justecon,
—mi klarigis al mia edzino la okazintan situacion.

—Por vespermanĝo vi estu hejme. Je kioma horo vi revenos? — demandis la edzino.

Dolorigis min tiuj ŝiaj vortoj. Kion ŝi pensas? La geografion ŝi ne scias, Bjalistokon.

—Foririnte vi ne vagabondu ie ajn, ne diboĉu! — avertis min la edzino. — Iru vi kaj trovu tiun, do, mi ne scias kiun, kiu...

—Kaj kio estu tiam? — demandis mi.

—Vi provu pace, amike interkonsenti, sed se tiu ne subiĝos — batu lin. Kion vi volas, tion vi faru... Iru vi, — respondis mia edzino. — Tamen sciu vi, ke ĉiuj vagabondoj kaj trampo, migrintaj tra la tuta mondo, finfine komprenas, ke la vero kaj feliĉo estas hejme.

— O-ho! — ekmiris mi. — Eble ankaŭ al mi tiel okazos... Sed kiel la feliĉo povas aperi hejme? Kie povas esti ĝi? Ĉu vi komprenas, kion vi parolas?

En la profundo de la koro mi sentis min kulpa, pro tio, ke mi ne kulpas. Sed kion fari? Mi prenis la dorsosakon, metis tien iom da manĝaĵo, „Fundamenton de Esperanto“... kaj mi forlasis mian hejmon. Tamen lasinte min trans la pordon, longe mia edzino rigardis el la fenestro. Min atakis timtremo. La okuloj malheliĝis kaj la koro batis kvazaŭ la tamburo. Tamen ĉiuj grandaj intencoj komenciĝas ekde la unua malgranda paŝeto. Kaj tiu unua paŝeto direktis min suden. Mi trairis la urbon Kaŭno kaj atingis ponton trans la rivero Nemunas. Sur la ponto mi ekvidis homon, kiu staris sur la apogilo kaj rigardis al la akvo.

—Kion vi faras, hej, la bona homo? — demandis mi.

—Mi estas komencanta esperantisto Arunas. Antaŭ unu jaro mi komencis lerni Esperanton... Tamen, ho ve... mi ne sukcesis venki la akuzativon kaj enkapigi interpunkcion.

—Kaj pro tio vi pretas salti de sur la ponto? — ekinteresiĝis mi. — Iru vi kun mi, — invitis mi.

Kvankam Arunas estis sufiĉe blindeta, per dekstra orelo surda, tamen la bonhumoro lin ne forlasis. Enmane li havis „Esperanto ŝlosilon“. Ni iris malrapide, tenante unu la alian je subbrakoj, turnante nin dekstren aŭ suden. Posttagmeze ni aliris la

urbon Prienaj. Tie ni ekvidis viron. Li estis ĉifonita, nerazita. Tiu ĉifonulo afable demandis nin :

—Kien vi iras?

Ni afable respondis :

—Ni iras al Bjalistoko. Kaj kien iras vi?

—Mi iras hejmen. Do sekve ni iras samdirekten, — respondis ĉifonulo.

Poste li kliniĝis al mia orelo kaj mallaŭte demandis :

—Ĉu vi estas drinkuloj?

—Nu ne, ĉu ni similas ilin? — demandis mi konfuziĝinte.

—Ĉu vi estas pederastoj? — ne ĉesis li.

—Nu ne! Tute ne! Ni estas normalaj! Ni estas esperantistoj! — kolere diris Arunas.

—Ho, tio estas tre prudente, tio estas laŭdinda, salutinda — eklaŭdis nin la ĉifonulo. — Mi estasksesperantisto Dominiko. Esperanton mi forlasis antaŭ du jaroj pro la familiaj kaŭzoj. Do mi iros kune kun vi.

—Pripensu vi, — diris mi. — La vojo reen ne estos.

—Mi jam decidis, — respondis Dominiko kaj ekŝanceliĝis.

Kaj ni jam iris triope. Ni interparolis pri la vivo, pri Esperanto. Ne pri politiko. Tie ĉi Dominiko ŝajnis sin ege postrestinta. Ne sciis li, kiu estas aŭtoro de Esperanto, kiam aperis la unua lernolibro de la lingvo ktp. Ni konatiĝis kun bona kaj pacema hometo, tia estis Dominiko. Ni pluiris foren apogante unu la alian ŝultro ĉe ŝultro. La vento blovis rekte al niaj vizaĝoj... Ie malproksime bojis la hundo... vesperiĝis. Kaj en ĉiu hejmo, en ĉiu vilaĝa domo ekbrilis la lumo. Post la sunsubiro ni kolektiĝis en la neglektita, forlasita fojnejo por ripozi kaj iom manĝi. Kaj ni ĉiuj tuj ekdormis... Ni vekigiĝis pro la strangaj sonoj, ni timskuiĝis.

—Pro kio vi bruas? — vekigiĝinte parolis Dominiko.

Iomete ripozinte nia grupo ree komencis marŝi. Po iomete sunleviĝis kaj baldaŭ aperis la ombroj. Sur la vojrandoj mi ekvidis mian ombron: ĝibiĝinta, kapon kliniginta. “Ho, Dio mia, kia mizerulo! Ĉu tia estas la paŝmaniero de esperantisto?” — pensis mi. „Tiel pensi povas nur ne edukita homo“, — nervozigiĝis mi. — “Onidire, naciaj trajtoj... Tia estas la malbenita

litova kutimo grumble”. La vizaĝon mian surverŝis larmoj, kaj min subtenis nur la espero, ke en tiun sanktan lokon mi eniros unuspeca kaj eliros tute alia homo: libera kaj fiera, konfidanta sin mem.

Tuj mi rimarkis, ke la pejzaĝo ne ŝanĝiĝas... Ĉu ni perdis la vojon? Iu pugnoŝuis min je flanko.

—Ĉu ni devojiĝis? Ĉu ni ĝisiros? —interesiĝis Arunas.

Mi sentis la varman spiradon de la samideanoj. Dum ni parolis tiele, al ni proksimiĝis iu viro kaj li iris kune. Ni ne konis lin, tiam mi elsakigis “Fundamenton de Esperanto” kaj montris al li. Lia buŝo malfermiĝis kaj li agnoskis, ke li ankaŭ estas esperantisto. Li elsakigis PIV kaj montris al ni.

—Ĉu vi scias, kiu estas mi? — demandis tiu.

—Ni ekscios, — respondis mi. —La homo! Jen kio!

—Mi estas Paŭlo, veterano. Mi volas iri kune kun vi. Mi ne ĝenos vin.

Nin preterveturis du ŝarĝaŭtoj. Tuj, kvazaŭ intence, komenciĝis la pluvo, kaj bonhumoro nia tute malboniĝis. “Kien iri, kien ni kaŝu nin? —ĉirkaŭrigardis mi. Ni kaŝis nin sub la arbo. “Jen bastono, dorsosako... Somero en la koro... Ĉu multe la homo bezonas?” —pensis mi. La pluvo abrupte ĉesis. Longe ni iris suden. La vento blovis norden kaj klinigis nin alteren. Ni haltigis iun hometon kaj demandis:

—Ĉu ankoraŭ malproksimas?

—Malproksimas, sinjoroj. Malproksimas, — respondis tiu.

Ni ekvidis sur la vojrandoj kaj ŝajnis, ke ni estas arbostumpoj.

—Ĉu vi scias, kie ni estas? —ekinteresiĝis la eksesperantisto Dominiko.

—En Eŭropo, en Litovio, — rediris mi, pri kio mi estis certa.

Sur la vojo aperis virino portanta la rastilon sur la ŝultro. Mi kaptis momenton kaj demandis ŝin:

—Kie estas la vojo al Bjalistoko?

—Vi iru, — ŝi diris, — rekte. Estos arboj. Ankaŭ arbustoj estos. Vere, ankoraŭ estos fostoj. Vi iru, iru.. Aliros vi grandan vojkruciĝon. Apud ĝi antaŭe

estis bovina farmo. Eble eĉ nun ĝi situas tie. Do vi iru...iru...

—Kaj turni flanken, ĉu necesos?, — demandis Dominiko.

—Kien turni? — redemandis la virino.

—Sur la vojkruciĝo, ĉu necesas flanken turni? —ripetis demandon mi.

—Ĉu mi scias? —ekdubis ŝi, — Tio estas via afero. Se mi vojaĝus, do mi flanken turnus tie, kie mi volus. Kiam la homo ne scias pri kio demandi, tiam li silentas, —montris spritecon la virino.

—Vidu vi! Ĉu oni ne rajtas demandi? Tpfu, — kraĉis mi kaj, ofendiĝinta, ekvidis denove. —Al la homoj neniam plaĉis kaj neniam plaĉos la krudeco, malspriteco, malĝentileco... al mi tio ankaŭ ne plaĉas.

Ni ĉiuj kaŝis nin en la arbustoj. Nur veterano Paŭlo ankoraŭ longe al iu minacis permane kaj ion klarigis. Ekpensis mi profunde kaj enhave, pri la homo inter homoj. Iom ripozinte, ni ekstaris kaj iris plu. La vento blovis kontraŭ nin. Posttagmeze de la tria tago ni venis al la urbo Alitus. Sur la urba placo nin renkontis la samideanoj de la loka esperantista klubo. Tie ni parolis pri la senco kaj esenco de Esperanto, kaj nek unu gramon da propaganda — nur veron, sen iu ajn plibeligo. Tamen neniu nin aŭskultis. La homoj ien rapidis, senatente preterkuris nin. Al mi ŝajnis, ke la homoj estas malsaĝaj, se ili ne komprenas, kion oni posedas.

—Jen, jen. Ne nervoziĝu, ĉio estos malbone, — diris Dominiko.

—Neniam plu! Vi ne plu tion diru! Ĉu vi aŭdas min? — kolere eldiris mi tra la dentoj, post kiam ni forlasis urbon Alitus. — Ni, esperantistoj, ankoraŭ ne perdis la ligojn de la homo al la homo. Jen, kie estas nia forteco. Ni iru, ni iru la vojon celitan. La vojo, vojaĝo... kaj dum la vojaĝo okazas aventuroj, renkontiĝoj, konatiĝoj...ĉu ne? Nur rekte, kuraĝe kaj ne flankeniĝante...

Jam dum kvin tagoj ni piediris. Dumvoje ni parolis pri ĉio tio, kio okazis al ni en nia vivo. Tiel interparolante, vespere ni atingis urbeton Vejsejaj. Veninte en la urbeton, ni direktis nin al la monumento, starigita omaĝe al la majstro

L.Zamenhof. Antaŭ la monumento ni klinis nin ĝis la tero kaj trifoje parolis “Patro nia...”. Ĉe la monumento nin aliris iu viro, iom strange vestita, kun verda ĉapo kaj alparolis en pura Esperanto.

—Saluton, samideanoj. Mi estas loka esperantisto Petro. Ĉu vi bezonas iun helpon? Mi pretas helpi vin.

Petro ĉiĉeronis nin tra la urbeto. Li montris al ni ĉiujn lokojn litigitajn al nia majsto. Vespere ni ĉiuj kunvenis ĉe Petro, en lia hejmo. Dum la vespermanĝo ni daŭrigis nian interparoladon.

—Ni, esperantistoj, estas egalaj, ĉar ĉiu homo naskiĝas libera, — parolis Paŭlo.

—Tamen sen pantalone, — rimarkis Petro. — Sed se vi estas sen pantalone, kiuj povas esti viaj rajtoj, via libero?... En la junaĝo oni iĝas dependaj de la virinoj kaj de aliaj ebrigaĵoj... Iom poste oni jam dependas de la politiko, de stomako, renoj kaj hepato... Kie estas tiu libero? — parolis Petro.

Mi ŝajnis la ofendiĝinton. Petro estas nia amiko, samideano, tamen la vero pli gravas.

—Ni jam delonge parolas, ke esperantistoj devas elpaŝi publike, iri amase sur la stratojn. Kaj ni ekvidos tiam, ke diskuros ĉiuj kontraŭuloj, — parolis Paŭlo. — Ni devas pruvi, ke ni nenion timas kaj nenie kaŝas nin. Kion ni celis dum tiom da jaroj? Publikecon!

—Ne pri tio vi parolas, — malkontentis Petro. —Ĉiu el ni devas plenumi la certan mision. Mi devas plenumi mian mision, sed mi ne scias, kia estas tiu misio. —Tamen la tempo kuras kaj forportas ĉion la plej bonan. Tio min maltrankviligas.

—Do, vi iru kun ni al Bjalistoko, — Paŭlo invitis Petron.

Sekvontage, matene ni, jam kvinope, forlasis urbeton Vejsejaj kaj direktis nin al Bjalistoko. Ĉe la landlimo nin haltigis policistoj. Ili suspektis nin, ke ni estas kontrabandistoj. Ili kontrolis la enhavon de niaj poŝoj kaj reviziis niajn vojaĝsakojn. Tamen mi ne koleris kontraŭ ili. Tia estas ilia laboro. Suspektinde ni aspektis, precipe mi. Malbela estas mia vizaĝo, kripla. Policistoj batis nin per gumitaj bastonoj. Ili rajtas bati la homon. Sed kiam ili

komencas bati, tio ekplaĉas al ili. Ili batas ĝis batmortigas la homon. Ni ne atendis, ĝis ili batmortigu nin, ni tuj diskuris. Ni kuris kiom ni povis, kiom kapablis. Ni kuris, longe kuris. Post la duhora kurado, ni kolektiĝis apud la vilaĝo Berzniki. Eksidis ni sur la bordo de lago kaj sincere rakontis unu al alia, kiel ni sukcesis eskapi for de policistoj.

—Mi jam laciĝis, — plendis Dominiko. —Tre malproksime mi devojiĝis, mi faris grandan kurbon flanken.

—Tamen vi ne misvojis, vi ĝuste trovis la vojon, — rimarkis Arunas.

Mi ekrigardis ĉiujn. Ili ŝajnis lacaj kaj bezonis ripozon. Mi levis la kapon kaj demandis:

—Kion ni faru, viroj?

—La fino! — parolis Dominiko. —Al mi sufiĉas!

—Kian solvon vidas vi? — senpacience demandis mi. — Kio plej gravas via opinio?

—Sciu vi, mi ne plu volas iri... Al mi sufiĉas, - ne cedis Dominiko. - Por kio tio ĉi?

—Por vi! Tio estas via vivo, via estonteco, via strebo, via celo... — parolis mi. — Ĉiuokaze vi konduku, kiel vi volas.

Dum tiaj minutoj de memdecido necesas posedi la sanan percepton. Dominiko gratis sian okcipiton kaj baldaŭ rediris:

—Bone. Por ke ni ne perdiĝu, mi invitas vin iri plu, tamen vi promesu, ke ni iros kune kaj ne rapidos...

—Mi promesas, — diris mi, — ĉiufoje post ĉiu vojkruciĝo kaj vojkurbiĝo ni trovos tempon por interparoli, ni pridiskutos la vojsignojn kaj nepre ĉiuj kune...

—Tiam ni leviĝu, — diris Dominiko, —li metis sur la ŝultron vojsakon kaj turnis sin laŭ montrita direkto. Irante oni devas observi la vojon kaj vojsignojn. La vojsignoj avertas, malpermesas, konsilas aŭ erarigas. Pro tio, neperdante rapidecon, necesas observi la vojon, portempe halti kaj pridiskuti signifon de la vojsignoj. Blinde konfidi la signojn oni ne rajtas, ĉar tiuj signoj estas trompantaj kaj dusencaj. Des pli en la fremda lando. Ni ne rapidante, apogante unuj la aliajn je subbrakoj, ekmarŝis plu. La vojo kuŝis tra arbaro, ĝi estis rekta kaj longa. La vetero estis somere varma. Nin

preterveturis aŭtoj, leĝeraj kaj ŝarĝojn veturigantaj, senhalte. Tamen ni marŝis perpiede kaj restis kontentaj. Vespere de la sepa tago ni atingis urbon Aŭgustavo. En tiu urbo ni renkontis neniun esperantiston. Sur la urba placo ni parolis pri la interna ideo kaj esperantismo. Tamen neniun aŭskultis nin, ĉiuj homoj preteriris senhalte, ien rapidis kaj ni restis senesperaj. La parolado nia rompiĝis. Ni staris silente. Post la certa tempo ni komencis nervoziĝi, ĉar, same kiel multaj normalaj homoj, ni ne povis silenti. Ĉar tio ne estas agrabla. Mi ekkuraĝis kaj alparolis preter paŝintan virinon:

—Saluton, sinjorino. Ĉu vi volas lerni Esperanton?

—Tak, slucham, pana, — respondis ŝi. —Niu rozumiem¹.

—Esperanto, internacia lingvo, —ripetis mi.

—On mowi językiem Esperanto², — rediris ŝi.

—Czy warto się zajmowac językiem esperanto³?

—Jes,jes! Ĝuste. Vere, — parolis mi.

—Nie mam ani pieniędzy,ani czasu⁴, — diris ŝi, ŝvingis permance kaj foriris.

Paŭlo rimarkis:

—Rigardu, ĉiuj ien rapidas, hastas. Neniu volas vane perdi la tempon.

Ni eksidis sub la arboj por iomete ripozi. Proksimiĝis la krepusko, ĝi densiĝis. Nin komencis ataki kuloj. Ni sentis, ke nin forlasas la fortoj. Ni deziris ĉion ĉesi. Tamen ni sciis —ĉesi estas facile, sed komenci estas malfacile. Ni kunpremis la pugojn, ekstaris kaj foriris laŭ malpuraj stratoj kaj senlumaj stratetoj, kie fantomis ankoraŭ pli malpuraj kaj mallumaj homaĉoj. Tamen ni jam timis nek ŝtelistojn, nek banditojn, nek rabistojn, ĉar ni havis malamikon, pli fortan ol tiuj ĉiuj kune metitaj.

Descendis la nokto.

Hela, ripozinta plenluno aperis trans la supraĵoj de la arbopintoj. Milda, opaka ĝia lumo surverŝis vojon. La vojo serpentumis al la arbaro. Silente, senbrue susuris arboj. Ni marŝis plu. Ie ekbojis la hundo. En la antaŭarbaro al hunda voĉo respondis la eĥo. Plenluno supreniris pli kaj pli. La vento plifortiĝis, kaj luno kaŝis sin en nuboj. Ni retrofleksis kapojn, ekrigardis lunon, ĝi mankis. Ni mallaŭte, apenaŭ aŭdeble, blasfemadis. “Hejmen ni ne revenos...,”

—nestis en niaj kapoj. —Ni scias nian vojon kaj ni iros ĝis la fino... Jam ne malproksimas” Mi rememoris mian edzinon En mia kapo restis ŝiaj vortoj, — “... la vero kaj feliĉo estas hejme.” Nur steloj prilumis nian vojon. Niaj piedoj rifuzis nin porti. Ni haltis kaj alvokis:

—Ĉu estas iu ĉi tie?

La silento.

—Hej, homoj!

La homoj mankis, nokto silentis.

—Kion ni faros nun? — demandis Petro. — Ĉu ni iros plu aŭ haltos kaj atendos?

—Sufiĉos por hodiaŭ, —diris mi. —Ni ripozu.

Apud vojo, en arbaro ni aranĝis bivakon, bruligis lignofajron. Ni estis tre lacaj, ni iomete manĝis el niaj sakoj kaj preparis nin por ripozi. La somera nokto estis varma kaj kvieta.

Tamen matene la humoro nia estis stranga. Ĉu ni ĝisiros? .La pejzaĝo restis tia sama, ne ŝanĝiĝis: la arbaretoj, kampoj, valoj, riveretoj, lagetoj. “Ĉu ni devojiĝis?” —venis penso en mian kapon. Ambaŭflanke de la rivero Biebrza vilaĝanoj falĉis fojnon. La aero bonodoris je freŝa fojno. Kaj vetero estis varma kaj agrabla. Kia bela la vetero! Eĉ sen la nubeto surĉiele. Ekblovis freŝa venteto— karesa vento somera. Ni iris, tutan tagon iris, de la sunleviĝo ĝis la sunsubiro... Nin preterveturis diversaj aŭtoj, tamen ni iris perpiede... Venis la vespero, sunsubiris. Jen la krepusko. Ni restis solaj survoje, inter la kampoj. Neniu vilaĝo videblis, neniun kampodomo. Por ripozo ni trovis apudvoje stakon de freŝa fojno. La dormo sur la freŝa fojno estis bona kaj agrabla. Sur la firmamento flirtis indiferentaj steloj kaj ridetis nia kunulo la luno. Ni ekdormis kaj ripozis sensonĝe .Kun unuaj radioj de la suno ni vekigis kaj ekiris. De la frumateno ni marŝis kaj vespere ni jam trairis preskaŭ kvardek kilometrojn. Ju pli foren ni marŝis, des pli ni rapidis. Nur antaŭen kaj antaŭen. Al Bjalistoko, al nia celo.

—Dodąz idziecie, panstwo⁵? — demandis nin survoje renkontitaj vilaĝanoj.

—Kien ni volas, tien ni iras, —arogante respondis Paŭlo. —Kia estas via afero?

—Ni estis jam lacaj kaj nervoziĝis.

Tiel ni iris, marŝis antaŭen, nur antaŭen, ĝis kiam ni aliris grandan arbaron. La arbaro ne gastame muĝis kaj timige bruis. Mi por minuto haltis, sed aliaj kunirantoj ne komprenis pro kio. Ni, ŝajne la unuan fojon dum la tuta nia vojaĝo, ekrigardis unu la alian al la okuloj.

—Amikoj miaj, —mi turnis min al kunirantoj. — Ni trairis longan vojjon, ni renkontis multajn ŝlimecajn marĉojn, lantajn riverojn, profundajn lagojn kaj malhelajn arbarojn. Ĉu ĝi, tiu fia, aĉa arbaro, haltigos nin? Ne! Ni nepre trairos tiun arbaregon! Kuraĝe antaŭen! Ne flankiĝante! Ni paŝo post paŝo atingos la celon.

Nin mordis kaj pikis sangon soifantaj insektoj, tamen ni marŝis kaj marŝis antaŭen.


Kiam ni, post longa irado, eliris la arbaron kaj atingis riveron Suprasl, nia ĝojo estis senlima kaj senfina. Ni ploris pro la ĝojo kvazaŭ malgrandaj infanoj, kiel infaneciĝintaj maljunuloj. Malproksime, en la horizonto vidiĝis blankaj tegmentoj de Bjalistoko. Arunas instigis nin marŝi antaŭen. Ĉar ni estis tre lacaj, ni lavis nin en la rivero kaj restis ripozi sur bordo de Suprasl.

Kun la unuaj radioj de la leviĝanta suno, en deka tago de la irado, nia grupo aliris Bjalistokon. Ho, kiel mirinda aspektis tiu urbo en tiu ĉi valo kun la rivero Bjala. Lando, en kiu vivis L. Zamenhof, vere estis eksterordinare ĉarma. Veninte en la urbon ni direktis nin al kultura Centro de Ludoviko Zamenhof. La celo de la Centro estas disvastigo de la ideoj de Esperanto-movado, proksimigi la diversajn kulturojn, verki la lokan identecon kaj instigi la dialogon inter diversaj popoloj. Nin impresis, konstante funkcia en la Centro, la ekspozicio “Bjalistoko en la junaĝo de L.Zamenhof”. Ni trovis ĉi tie tre riĉan bibliotekon de Esperanto-literaturo. Tiom da libroj! En la Centro ni renkontis bjalistokan samideanon Andrzej. Li volonte konsentis ĉiĉeroni al nia grupo tra la urbo. Unue ni vizitis lernejon, en kiu en 1869-73 jaroj lernis Ludoviko. Ĝi malmulte ŝanĝiĝis ekde tiu tempo. Poste ni trairis tutan L. Zamenhof-straton. Ni aliris lokon, kie loĝis la familio de L. Zamenhof. La loĝdomo ne ĝisrestis. Ĝi estis detruita kaj anstataŭ

ĝi, sur ĝia loko estis konstruita multetaĝa, multloĝeja domo. Sur la balkono de dua etaĝo de tiu domo ni ekvidis mem Ludovikon Zamenhof. Li aspektis kvazaŭ viva, kvankam estis pentrita. Sur la fenestrobreto de la unua etaĝo sidis Jakub Ŝapiro, la plej fama esperantisto de la intermilita periodo, bjalistokano kun iu alia ĵurnalisto. Ni vizitis ankaŭ la skvaron de L. Zamenhof, kie en la apuda Lipowa strato staris monumento omaĝe al L. Zamenhof. Ni trifoje kliniĝis ĝis la tero antaŭ monumento. Ni estis ravitaj pro ĉio vidita, la impresoj abundis. Finfine ni vizitis hotelon-restoracion “Esperanto”. Ĝi estis impona. Aŭdi kaj mem vidi estas du malsamaj aferoj. Kiel la aeron, kiel la akvon esperantistoj bezonas impresojn, renkontiĝojn, konatiĝojn. Kaj ni tion spertis.

Tiu ĉi ununura en mia vivo la vojaĝo al Bjalistoko elradike kaj plene ŝanĝis mian karakteron. Ĉiuj scias, kia mi estis vulgarulo, impertinentulo, sentaŭgulo, parolanta la fuŝitan Esperanton, kaj fojfoje eĉ senmezure. Mi kaj miaj amikoj-kunirantoj ŝanĝiĝis plene kaj iĝis afablaj homoj, ĝisostaj esperantistoj, pretaj helpi al ĉiu. Necesas, ke ĉiu esperantisto, almenaŭ unu fojon en la vivo, vizitu Bjalistokon, la naskiĝurbon de L. Zamenhof kaj Esperanto. Por ke ĉiu eksentu la spiriton, kiu regas tie, kaj la animon, kiu nestis en la koro de nia majstro.

Geografion oni povas forgesi, sed la historion — neniam.



Glosoj:

- 1.(en pola lingvo) Jes, mi aŭskultas,sinjoro. Mi ne komprenas.
- 2.(en pola lingvo) Li parolas en Esperanto.
- 3.(en pola lingvo) Ĉu valoras okupiĝi pri Esperanto?
- 4.(en pola lingvo) Mi havas nek monon, nek tempon.
- 5.(en pola lingvo) Kien vi iras, sinjoroj?

Pipi (Ĉinio)



Paro da ledaj ŝuoj

Dum mia tuta vivo mi ĝuis multajn parojn da ledaj ŝuoj. Kiom da? Mi ne memoris. Sed nur unu paron da ledaj ŝuoj mi neniel povis forgesi eĉ ĝis la morto. Tiun paron mi aĉetis kiam mi estis en la aĝo de 30 jaroj.

Tio estis aŭtuna frumateno. Mi frue ellitiĝis, ĉar mi planis iri al Dalian* por ĉeesti Esperantan kunvenon. Mi tuj post la manĝo okupis min per vestado. Mi surportis miajn elegantajn okcidentan veston kaj kravaton. Post tio mi elhejmiĝis, kaj taksie veturis al la stacidomo. Ĉ. 40 minutojn poste mi atingis la stacion.

Kiam mi atendis trajnon en la atendejo, mi subite trovis, ke mi surhavis vojaĝŝuojn. Fulmo kaj tondro! Jen mi forgesis porti ledajn ŝuojn! Restis nur ĉ. 30 minutoj ĝis la alveno de la trajno. Estis jam tro tarde se mi iris returne hejmen por ŝanĝi ledajn ŝuojn. Kion fari? Ŝanceliĝinte kelkan tempon, mi decidis aĉeti unu paron da ledaj ŝuoj en magazeno situanta najbare de la stacio. Mi hastis en la magazinon direkte al la vendotablo por ŝuoj. Post longa okulmezurado, mia rigardo haltis sur paro da purpurruĝaj ŝuoj el dura bovledo, kun la fabrikmarko de "Maljunula Kapo" kaj kun la prezindiko de 380 juanoj. Fingromontrante al la paro da "Maljunulaj Kapoj", la vendistino rimarkigis al mi ke restas nur unu paro da 41-mezuraj ŝuoj en tiu speco kaj ŝi donus al mi rabaton se mi volus. Nee skuante la kapon, mi diris al ŝi ke la mezuro de la ŝuoj, kiujn mi portas, devas esti 43 kaj tiu paro estas du numerojn malgranda. La vendistino asertis al mi, ke ledaj ŝuoj ju pli uziĝas, ili fariĝas des pli malstrikta, kaj tio certe ne estos problemo se mi povas enmeti en ilin miajn piedojn. Mi estis konvinkita de la vendistino, kaj provis ilin. Estis vere, ke miaj piedoj eniris. La vendistino petis min fari kelkajn paŝojn por sperti ĉu aŭ ne ili estis oportunaj. Post kelke da paŝoj, mi sentis, ke ili estis komfortaj. Fine mi prenis ilin kontraŭ 300 juanoj.

Deponinte miajn vojaĝŝuojn en la deponejo, mi envagoniĝis. Sidante sur la kanapo, mi de tempo al tempo mallevis mian kapon kaj ŝate okulkarezis tiun paron da belaj "Maljunulaj Kapoj". Mi sentis ekstazon.

Post ĉ. unu horo, la trajno eniris la stacion de Dalian. Mi elvagoniĝis kaj elstaciĝis. Mi bezonis piediri duonhoron por atingi la kunvenejon. Mi grandpaŝe iris kaj iris, kantetante, iris kaj iris. La ĉielo estis klara kaj la aero estis freŝa. La vetero estis tre bela. Mi estis vigla kaj en gaja humoro.

Post ĉ. dekelke da minutoj da vojado, mi ricevis la senton, ke la ŝuoj estis iom striktaj. Eble ĝuste kiel la vendistino diris, ke novaj ŝuoj komence estas striktaj! Mi tiel konsolis min mem en la koro. Sed ju pli mi iris, ili des pli kaj pli striktiĝis kaj premis min. Miaj piedoj estis en la dilemo, ĉu iri antaŭen aŭ ne. Kiel miaj piedfingroj, tiel ankaŭ miaj maleoloj ekstreme doloris min. La boranta doloro min draste atakis. Mi havis tian senton, kvazaŭ du monstroj per akraj dentoj ĉirkaŭmordus miajn maleolojn. Mi havis neniun alian elekton, ol malrapidigi la marŝon. Mi paŝo post paŝo lante movis miajn piedojn antaŭen kvazaŭ per tiaj paŝoj, per kiaj iris la virino kun vinditaj piedoj pasintecce en antikva Ĉinio. Premante la dentojn kaj glutante la mordantan doloron, mi finfine min trenis tra la tuta vojo ĝis la celo ...

Tiun tagon, la ŝuoj terure min ĉagrenis kaj doloris. Ili tiel turmentis min, ke mi apenaŭ volis plu vivi! Mi sentis tian embarason, kiam mi neniam antaŭe sentis. Kiel mi volis detiri ilin kaj dispiedbati kiel ĉifonojn tre tre malproksimen!

Reveninte hejmen, mi demetis tiun damnindan paron da "Maljunulaj Kapoj". Miaj piedfingroj kaj maleoloj ricevis frotvundojn kaj la sango makulis miajn ŝrumpetojn. Vidante tion, mia edzino hahae diris al mi:

"Forĵetu ilin! Preferas esti sub miaj ŝuoj ol toleri ilin, ĉu?"

"Ili estas tre novaj kaj karaj. Kiel domaĝe forĵeti ilin!" mi objetis.

"Laŭ vi, kion ni faru pri ili? Ili estas tro malgrandaj por vi. Se vi volas porti ilin plu, estas pli bone, ke vi

